

UNESCO onidire ne plu restas tio, kio ĝi iam estis. Feliĉe! Ankaŭ la mondo ne devus resti tio, kio ĝi nun estas, inter aliaj sur la kampo de komunikado kaj lingva egalrajteco. Se Usono forlasis UNESCon antaŭ unu jaro, se Britio vasale sekvis antaŭ kelkaj semajnoj, tio grave malkontribuas al la kaso de UNESCO, sed ĝi devas aliflanke kontribui al la prestiĝo de UNESCO, ĉar ĉiam estas virto rifuzi danci laŭ la trudita muziko. UNESCO estas la ĝusta amiko de la Internacia Lingvo. Ni bezonas ĝian apogon, same kiel ĝi meritas la nian. De grandpotencoj trudantaj ilian gepatran lingvon al la tuta mondo ni ne povus subtenon atendi.

Kvankam la ideo pri nova elpaŝo antaŭ UNESCO jam delonge ŝvebis en la aero, nur dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo la Komisiono pri Ekstaraj rilatoj de UEA formulis rezolucion (ĉefa redaktanto Dr. H.Tonkin) proponotan al UNESCO. Ĝi aperis oficiale kiel propono de Jugoslavio la 15an de oktobro, kaj dum la sekvaj kelkaj tagoj aldoniĝis la subskriboj de Bulgario, Ĉinio, Hungario, Kostariko, Pollando kaj San Marino. La oficiala delegato de UEA Tibor Sekejl prezentis sin dum 12 minuta parolado al pleno en angla lingvo. La voĉdonado okazis la 8-an de novembro 1985 en la kulturdomo Ljudmila Ĵivkova en Sofio kaj la rezolucio estis unuanime akcentita. La ĝenerala direktoro S-ro M'Bow al demando de intervjuisto de la bulgara televido donis tre favoran respondon opiniantan pri Esperanto kaj ĝia estonteco. Kiam Tibor Sekejl dankis pro liaj belaj vortoj, li modeste diris: „Tio estas mia konvinko. Ĉar Esperanto estas ne nur lingvo, ĝi estas humanisma movado, kiu celas interkomprenigi popolojn kaj kulturojn de la mondo.“

Ni petas niajn legantojn, ĉar ĝi estas baza propaganda ŝtono por nia plua agado kaj varbado, bone noti la plenan tekston de la rezolucio – kiun ni sube disponigas kun klarigoj al la lingve ne tro progresintaj adeptoj de nia lingvo:

UNESCO už prý není tím, co kdysi bylo. Naštěstí! Také Svět neměl by zůstat takový, jaký je nyní, mezi jiným na poli komunikace a jazykové rovnoprávnosti. Jestliže Spojené státy americké opustily UNESCO před rokem a Británie vasalsky před několika týdny, tak to citelně postihlo pokladnu UNESCO, ale musí to na druhé straně přispět k prestiži UNESCO, protože vždy je statečné odmítnout tancovat podle vnučené muziky. UNESCO je pravým přítelem Mezinárodního jazyka. Potřebujeme jeho podporu a ono si zaslouží naši. Od velmocí, vnučující svůj rodný jazyk celému světu nemůžeme podporu očekávat.

Aĉkoliv myŝlenka zнову vystoupit před UNESCem už dlouho se vznášela ve vzduchu, teprve během Universálního Kongresu v Augsburgu Komise pro zevní styky zformovala rezoluci (hlavní redaktor Dr. H.Tonkin), která měla být navržena v UNESCu. Objevila se jako oficiální návrh Jugoslávie 15.října, během následujících dní připojily své podpisy Bulharsko, Čína, Maďarsko, Kostarika, Polsko a San Marino. Oficiální delegát UEA Tibor Sekejl představil ho ve 12minutové řeči plenu v anglickém jazyce. Hlasování bylo uspořádáno 8.listopadu 1985 v kulturním domě Ljudmily Živkovové v Sofii a rezoluce byla jednohlasně přijata. Generální ředitel pan M'Bow na otázku reportéra bulharské televize velmi příznivě odpověděl svým míněním o Esperanto a jeho budoucnosti. Když Tibor Sekejl poděkoval za jeho krásná slova, skromně řekl: „To je mým přesvědčením. Protože esperanto není jen jazykem, je humanistickým hnutím, které má za cíl dorozumět národy a kultury světa.“

Prosím naše čtenáře, protože je základním kamenem pro naši další činnost nábor, dobře si poznamenat úplný text sofijské rezoluce, který zdola uvádíme s vysvětlivkami pro jazykově méně pokročilé adepty našeho jazyka:

REZOLUCIO DE UNESKO XI.4.4.218 akceptita de la Ĝenerala konferenco de Unesco la 8an de novembro 1985 en SOFIO:

FESTADO DE LA CENTJARIĜO DE ESPERANTO

La Ĝenerala konferenco,

K o n s i d e r a n t e, ke ĝi en sia sesio (shromáždění) de 1954 okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.4.422-4224- notis la rezultojn, atingitajn (dosažené) pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis (uznala), ke tiuj kongruas (suhlasí, splývající) kun la celoj kaj idealoj de UNESKO,

M e m o r i g a n t e, ke Esperanto intertempe faris konsiderantan progreson kiel ilo (prostředek) de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante (pronikati) en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

R e k o n a n t e la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj la malsamaj naciecoj,

N o t a n t e la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado (rozšiřování) de informoj pri la agado de UNESKO, same kiel partopreno en tiu agado,

K o n s c i a (uvědomující) pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. **G r a t u l a s** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. **P e t a s** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;
3. **I n v i t a s** la Ŝtatajn Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;
4. **R e k o m e n d a s** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigado de UNESKO.

Necesas aldoni, ke la rezolucio „povas signifi multon aŭ nenio“, kiel diras Sekejl. Sed ni havas gravan dokumenton en la mano, kiun ni povas antaŭmeti al la oficoj, petante permeson por instruo de Eo en interes-rondetoj de eksterlerneja instruado, vesperaj popolaj universitatoj.

Nutno donati ke rezoluce „mŭže znamenat mnoho nebo nic“ jak řiká Sekejl. Avšak máme důležitý dokument v ruce, který můžeme předložit úředním činitelům při žádosti o povolení vyučování v zájmových kroužcích mimoškolního vyučování, večerních universitách.

Plej konvene estus tiel fari nur per varba instrua prelego por korespondaj kursoj, kiuj trovis sian stabilan lokon en instruado de Internacia lingvo. Multaj povas objeti, kiel multaj asertas, ke nuntempe estus granda fiasko, se nia ŝtato konsentus enkondukon de Eo en niajn lernejojn, ĉar ni ne estas kapablaj amase eduki bezonatajn instruistojn. Pro tio oni povas agi diplomate kaj peti permeson poparte, eksperimente. Mi vere estas kapablaj enkonduki nur amasajn korespondajn kursojn, sur kiu kampo ni disponas per instruistoj kaj havas plej grandajn spertojn. Ĉiuj, kiuj faris la asocian ekzamenon kapablus korekti almenaŭ komencajn 5 ĝis 8 lecionojn de la koresponda kurso – la progresintaj lernantoj poste estus transdonitaj al pli spertaj instruistoj.

Espereble la ran-musa milito en nia asocia komitato finiĝos kaj la gvidon de tiel grava sfero povus transpreni la respondeculoj de la asocio mem. Sed la tempo urĝas! Ni ne devas fordormi la okazon!

En la lasta numero de Esperanto

Claude Piron, konata e-a propagandisto kontraŭbatalas kelkajn ofte uzatajn terminojn de e-a varbado: koncepton: „plani“, „krei“ kaj „universala“.

PLANI: (ofte uzata en orientgermana esperanta gazetaro) „Planita“ aŭ „konstruita“ lingvo – ne efikas bone. Notindas, ke Zamenhof ne agis plane. Li ne elpensis planon, kiun li konsekvence realigis. Lia maniero labori pli similis la agadon de pentristo ol de inĝeniero aŭ de planisto ekonomia. Se ne, kiel klarigi la fakton, ke la latina -tio produktas jen „-ĉo“ (kondiĉo), jen -“cio“ (nacio), jen -“ciono“ (leciono) aŭ ke la latina ex- povas naski ĉu „es-“ (esprimi), ĉu „e-“ (etendi), ĉu „eks-“ (eksciti). Eĉ la tipa artikolo „la“ rezultas ne el racia pensado, sed el sonĝo, kiel li mem foje klarigis. Tio montras, ke Z. ne agis sisteme, kaj do ne plane.

Nejvhodnĝjŝi by bylo uĉinir jen naborovu prĉdnášku pro korespondentní kurzy, které našly své pevné místo ve vyučování Mezinárodního jazyka. Mnozí mohou namítat, jak mnozí tvrdí, že kdyby náš stát přijal výuku esperanta do škol, bylo by to velkým fiaskem, protože bychom nebyli schopni hromadně vychovat potřebné učitele. Proto je nutno jednat diplomaticky a žádat povolení po částech, experimentálně. Jsme schopni zavést masově pouze korespondentní kurzy: na tomto poli máme učitele a největší zkušenosti. Všichni, kteří absolvovali svazovou zkoušku, byli schopni opravovat alespoň 5-8 lekcí korespondentního kurzu – pokročilejší žáci by byli potom předáni zkušenějším učitelům.

Doufejme, že žabo-myší válka ve výboru našeho svazu skončí a vedení tak závažné záležitosti budou moci převzít odpovědní činitelé svazu sami. Avšak čas spěchá! Nesmíme zaspát příležitost.

V posledním čísle Esperanta“.

Claude Piron, známý esperantský propagátor bojuje proti některým často užívaným termínům náborovým pro Esperanto: koncepcie „plánovat“, „stvořit“ a „universální“.

PLANI: (často užívané ve východoněmeckém esperantském časopisectví) „Plánovaný“ nebo „zkonstruovaný“ jazyk – neúčinkuje dobře. Stojí za zmínku, že Z. nejednal plánovitě. Nevymyslel plán, který by soustavně realizoval. Jeho způsob práce se spíše podobal malířovi ne inženýrovi nebo plánovači. Ne-li, jak vyložit skutečnost, že latinské -tio je vtĉleno do „-ĉo“ (kondiĉo), “cio“ (nacio), i “ciono“, nebo latinské ex může dát vznik „es“ (esprimi), nebo „e-“ (Etendi), nebo „eks-“ (Eksciti). I typický člen „la“ nepochází z úvahy, ale ze snu, jak on sám několikrát vysvětloval. To ukazuje, že Z. nejednal systematicky, tedy ne plánovitě.

KREI: Nun okaze la 100jariĝo oni ofte asertas, ke Eo estis kreita en la jaro 1887. Nevere, ĉar Eo estas multe pli ol la lingvaĵo de 1887. Dokumente praveblas, ke ja en 1878 la lingvo ekzistis, sed sub alia formo. Se vi diras, „Z kreis (inventis, elpensis) E-on“ vi misprezentas la historian veron, ĉar ne vivus la lingvo, se nur Z. ekzistus. Li mem ĉiam rifuzis ke oni nomu lin „kreinto“, kaj petis diri, ke li nur iniciatis la lingvon. Kiel oni propagandu? Ekzemple: „Eo estiĝis jene. En plej diversaj landoj ekzistis homoj, kiuj sopiris al komunikilo ebliganta al malsamlingvanoj interkompreniĝi. Juna poligloto proponis lingvaĵon, kiun verkis dum jaroj, kompanante poemojn kaj tradukante ĉefverkojn el diversaj literaturoj. La unuaj alprenis la komunikilon proponitan de la dua, kaj la uzado estigis vivantan lingvon, kiu oni nomas nun Eo.“ 1887 estas nur la dato de publikigo de propono, ne de lingvo-estiĝo.

UNIVERSALA: Tia vorto vekas precipe ĉe la etnaj nacioj timon, ke la propra lingvo ne povas ekzisti. Kiel en sciencfikcia verko, la veraj vivantoj malaperos cedante la tutan lokon al universalvora malnaturaĵo. Ni propagandu jene: „Eo estos lingvo por tiuj, kiuj ĝin deziras. Por etnaj grupoj ĝi prezentas okazon montri al la monda siajn kulturajn valoraĵojn.“

SANO-popularscienca bulteno aperis (numeroj 1-4/85 sume). Mendu por si kaj viaj eksterlandaj amikoj ĉe nia asocio (25 Kčs). Ek de la numero 2/86 ĝi aperos regule kaj publikigos la tutan serion de artikoloj ekologiaj: Homo kaj vivmedio – el plumo de inĝ Zdeněk Pluhař, originale verkitajn.

MALLONGE: ĈEA preparas fondon de financa konto okaze de la 100jariĝo de Eo. - ĈEDOK eldonis belan prospekton: Vizitu ĈSSR. Petu ĝin ĉe ĉiuj oficejoj. En la katalogo de enlandaj ekskursoj estas propagando pri SET Lančov, kie la 14tagaj kursoj komenciĝas la 29an de julio kaj finiĝas la 9an de aŭgusto. Prezo por membroj de ĈES 750 Kčs – informoj Esperanto 57401 Třebíč.

KREI: Nyni při 100.výročí často je ujišťováno, že Eo bylo stvořeno v r. 1887. Nepravdivé, protože Eo je více než jazyk roku 1887. Je možno dokázat, že už r. 1878 jazyk existoval, avšak v jiné formě. Jestliže řeknete: „Z. stvořil (vynalezl, vymyslel) Eo“ deformujete historickou pravdu, protože jazyk by nežil, kdyby existoval jen Z. Sám vždy odmítal, aby byl nazýván „tvůrce“ a prosil říkat, že byl jen iniciátorem jazyka. Jak tedy propagovat? Na příklad: „Eo vzniklo takto. V různých zemích byli lidé, kteří toužili po komunikačním prostředku, umožňujícím různě mluvícím dorozumění. Mladý polyglot navrhl jazyk, který během let vypracoval komponováním básní a překlady hlavních děl různých literatur. Jedni přejali komunikační prostředek od druhých navrhnutý, a jeho užití zrodilo živý jazyk, který nyní je jmenován Eo.“ 1887 je jen rokem publikace návrhu, ne vzniku jazyka.

UNIVERSALA: toto slovo vzbuzuje především u malých etnických skupin dojem, že jejich jazyk nebude moci existovat. Jako ve sciencfikcion, skuteční živí zmizí a postoupí celé místo nepřírozeným všežravcům. Propagujme takto: „Eo je jazyk pro ty, kteří si ho přejí. Pro malé národy dává příležitost ukázat svá kulturní bohatství.“

SANO-populárně vědecký buletín vyšel (č.1-4/85 najednou). Objednejte pro sebe i zahraniční přátele u našeho svazu (25 Kčs). Počínaje č.2/86 bude vycházet pravidelně a uveřejní celou serii ekologických článků: Člověk a životní prostřední – z pera ing. Zdeňka Pluhaře, původní dílo.

KRÁTCE: ČES připravuje konto ke stému výročí Ea. - ČEDOK vydal krásný prospekt: Navštivte ČSSR. Vyžádejte si ho ve všech úřadovnách. Katalog tuzemských zájezdů obsahuje propagaci Letního esp.tábora Lančov, kde 14denní kurzy začínají 29.června a končí 9.srpna. Cena pro členy ČES je 750 Kčs. Informaci si vyžádejte: Esperanto 67401 Třebíč.

Mirindan talenton por studo de nia kara lingvo montris du togo-land-anoj Gbeglo Koffi, BP 13169, Nyekogbe, Lomé, TOGO (lando)+Agmebadon Attiogbe, PB134, Aného, TOGO (lando), AFRIKO, lernintoj de la pasinta jaro. Ili nun dissendas ampleksan leteron kun detala priskribo de *vizitode* la papo Paŭlo la dua, kiu efektiviĝis en aŭgusto 1985.

Nova finstudintino de nia koresponda baza kurso estas tre talentita Tamara G r u s o v á , 1955, 14900 Praha 4, Dolanského 1390. Ne lasu ŝian talenton vane kaj invitu ŝin partopreni en nia movada vivo.

K r a f t Karel, Županovice 49, 26215 Borotice, o. Příbram, nia fidela kunlaboranto la 24an de februaro 60jariĝos. Li estas unu el tiuj junuloj, kiuj fondis en Žermanice la gloron de someraj tendaroj (nun Lančov). Lia pura lingvaĵo, profesia alpaŝo al eduko de granda vico de nun elstaraj esp-istoj, lia laboremo, honora konduto, modesto, kono de pacmovado historia kaj nuna, vekas ĉe liaj multaj amikoj admiron kaj estimon. Nun ni atendas publikigon de lia prilaboro de omaĝo al Martin Luther King, kiu aperos en PACO. S-ano Kraft dediĉis plene siajn fortojn *por esperanto* kaj *pacmovado* – tiuj fortoj restu ankoraŭ longe konservataj!

Niaj forpasintoj: T r o m b í k Paŭlo, 73996 Nýdek 334 subite mortis la 2an de julio 1985 en la aĝo de 64jj. Li partoprenis en tendaro en Lančov, UKo 1978, bone parolis kaj propagandis nian lingvon.

Dittrich František, Mn.Hradiště 915 – bona homo kaj nia fidela kunlaboranto kaj oferema helpanto, longjara esperantisto mortis la 23an de XI.1985. Li daŭre restos en nia memoro.

J a n d a Antonín, emerita lernejdirektoro, meritplena membro de ĈSSPB., 25203 Ĉernolice 86 en la aĝo de 78jj, mortis la 6an de XII 85.Kvankam li dediĉis siajn fortojn por Eo nur en la lastaj jaroj, li partoprenis ĉiujn niajn printempajn seminariojn kaj forte propagandis Eon.

Prof Dr Jaroslav P o l e n s k ý el Ĉes.Budějovice, Branišovská 25, post mallonga grava malsano forpasis la 19an de XII 85. Ĉiuj aktivaj esp-istoj konis lin - dum lastaj jaroj li rapide lingve elstaris, gvidis la rondeton en ĈB, redaktis progreson, elstaris en pedagogia sekcio, kontribuis por ĉiuj seminaĵaj programoj, gvidis kantadojn, instruis en Lančov, organizis sociajn ludojn. Lia forpaso forte estas *sentata* en nia movado.

R o u b í n e k Josef, Trutnov, Horská 451, mortis la 6an de januaro 86. Li estis elstara esperantisto, gvidanto de la klubo en Jablonec en tridekaj jaroj. En Trutnov li refondis la klubon. Ĉiuokaze propagandis nian lingvon, biciklis ĝis sia lasta 76a vivojaro.

H o n o r o n al ilia memoro!

R a p o r t o pri kvinjara aktivado en tradukado. En la jaroj 1981-85 partoprenis enkadre de E-rondeto en Mnich. Hradiště (informilo Verda Familio) entute 80 personoj. Kelkaj ĉesis partopreni kaj en la nuna tempo januaro 1986 en la progresinta grupo „P“ laboras 12 personoj. Ili tradukas esperantlingvajn tekstojn en la ĉeĥan. La grupo K/P tradukas esperantlingvajn tekstojn en la ĉeĥan. Tie ĉi laboras regule 10 personoj, ĉiuj el ili estas frekventantoj de skribaj kursoj ĉe Dro Hradil. Nove formiĝas grupo „K“ – freŝaj frekventantoj de la koresponda kurso en la jaro 1985-a. La spertoj montras, ke la frekventantoj de la koresponda kurso bone ellernas la lingvon kaj kapablas bone tradukadi esperantan tekston. Post unujara laboro, en kiu oni tradukas nur 4 paĝojn de la teksto A4 montriĝas konsiderinda progreso, malgraŭ la fakto la feria paŭzo estas 5 monata. Videble la daŭra, regula praktikado de la lingvo rezultigas bonan lingvoscion. Ĉiuj el la grupo „P“ kapablas senĝene kaj precize tradukadi ĉiun ajn tekston. Deziderinde estas, ke ĉiu klubo organizu ion similan por la membraro.

VI. jarní seminář v Mnichově Hradišti bude uspořádán ve dnech 25.-27.IV.1986 s omezeným počtem účastníků – viz přiložené pozvání.

ĈEDOK, CS 11535 Praha 1., Na příkopě 18

sendos al vi senpage novan broŝuron ĈEDOK prezentas al vi Ĉeĥoslovakion. Nepre sendu ĝin al viaj eksterlandaj amikoj.

Pošle Vám bezplatně novou brožuru ĈEDOK představuje Vám Ĉeskoslovensko. Urĉitě pošlete ji Vašim zahraniĉním přátelům.

Eva Lohnická, Mirotice 75, frekventantino do koresponda kurso anoncis sian edziniĝon kun Ladislav Lukŝajder la 18an de januaro. Ili akceptu sinceran bondeziron kaj de la redaktoro kaj de la legantoj de Verda Familio.

Somera Esperanto Lernejo okazos en Poprad ekde la 6a de julio kaj de la 20-a de julio. Informoj

Letní esperantská škola bude uspořádána v Popradu od 6. do 20. července. Informace

Slovenský esperantský zväz, 05801 Poprad, Sobotské náměstí 6.

Sekcio de handikapuloj de ĈEA organizas en la tagoj 13.-19.an de septembro 1986 renkontiĝon en Brno, aŭtokampadejo Obora sur Kníneĉ-Valbaraĝo kun instrua programo. La kampadejo estas bone atingebla per urba trafiko. Aliĝprezo 30 Kčs, lito 22 Kčs tage. Restoracio de la IIIa klaso (malmultekosta) loke. Perŝipa aŭ aŭtobusa ekskurso 50 Kčs (marde). Aliĝilojn (ankaŭ eksterlandanoj) petu ĉe

Sekce invalidů ĈES uspořádá ve dnech 13.-19.září 1986 setkání v Brně, autokemping Obora na Kníneĉské přehradě s vyučovacím programem. Kemping je dobře dosažitelný městskou dopravou. Přihláška 30 Kčs, lůžko 22 Kčs denně. Restaurace III třídy v místě (levná). Výlet lodí nebo autobusem 50 Kčs (úterý). Přihlášky (také zahraniĉní) posílejte na adresu

Vlastimil Sedlák, Kosmonautů 17, 62500 Brno.

La sekretario de ĈEA J.Kaŝparec petas transdoni liajn bondezirojn al la legantoj de Verda Familio kun mesaĝo kaj peto pri favorteno, malgraŭ mankoj en agado de lia ofico, kiu nun estas reorganizata. Starto estas preparata por preso.

Tajemník Ĉeského esperantského svazu Jar.Kaŝparec prosí o předání blahopřání ĉtenářům Verda Familio a poselství s prosbou zachování přízně přes nedostatky v ĉinnosti jeho úřadu, který je nyní reorganizován. Starto je připravováno do tisku.

KIEL DIRI? (Lentaigne) BESTOJ: „Kiam la katoj promenas, la musoj festenas. Ne turmentu bestojn. - Ĉasi: iri al ĉaso (lov). Batuo (hon). Kurĉasi. Ŝtelĉasi (odchyt). Harĉasaĝo (leporo, kapreolo ktp). Plumĉasaĝo (perdikio, fazanto). Fiŝĉasaĝo. Pafi ĉion, kion oni trovas. Ĉasa fusilo (loveĉká puška). Bestio (ŝelma). Pafi paseron, kaj trafi anseron. Diana la Ĉasistino. Nimrodo.

Korespondi deziras: (Mallongiloj-zkratky) bk=bildkartoj, ĉl=ĉiu lando, ĉt=ĉiu temo, dez=deziras, iŝ=interŝanĝas, itŝ=interesiĝas, j=jaroj, kol=kolektas, kor=korespondi, m=muziko, pm=poŝtmarkoj, s-ro=sinjoro, tm=tuta mondo.

Gekomencantoj ĉirkaŭ 60j serĉas kontaktojn. Gvidanto Andres Mellbratt, Aprigosgaten 85, S-42156 V.Frölunda, Svedio

Tri fratinoj-ĝemelinoj (trojĉata) Viara, Nadeĝda, Lubov, 14j itŝ baletoj, m, arto: Familio Antovi, Bulgario, Sofio, ul.Paul Grozdanov 33

Ing Natalia Ĵeleva, 32j, str.N.Nikolov N 114, vh.G ap.30, 6000 Stara Zagora, Bulgario + grupo da kamiistoj 30-40j kun tm pri ĉt

Tapani Lappalainen, Kivalakotikylä, 26j fraŭlo, SF-37500 Lempäälä, Finnlando ĉti, ĉl serĉas vivkunulinojn, petas foton.

E-klubo „SAMOTLOR“ SU-626 440 Niĵnevartovsk-9, Tjumenskaja obl., ul.Marŝala Ĵukova 10, pkk, bk, turisma literaturo, popolkostumoj

TONGLU-a Esperanto-Ligo, Zheijang-provinco, Ĉinio, pm bk iŝ, kor tm ĉt.

Krasnojarska Esperantista klubo, p.k.2420, SU-660075 KRASNOJARSK 75 itŝ plakatojn, afiŝojn, esperantaĵojn. - Geklubanoj dez dor: Viktor Borisov (pri radiotekniko, filmoj, politiko), Elena Ŝavarina (pm, arto), Tamara Nagornjak (bk, arto, modo), Ira Morozova (bk, arto).

Hiromi Mukaihata, 4-28 Taishocho, NAKAMURA-KU, NAGOYA-Shi, Aichi 453, Japanio, 14j lernantino, dez kor en perfekta lingvo Eo

Victor Granger, 5 Doris Str. Auckland 10, Novzelando, 52j dez kor kun samaĝulino, itŝ bk, pm.

Grupo da esp-istoj serĉas korespondamikojn. Skribu al: Elena Smirnova, Bolŝoj pr.47, kv.8, SU-197198 Leningrad

Buchheim Brigit-7251 Kühren, Bäckenberg 7, GDR, ĝardenistino, pri kakttoj

Esperanto asocio Cx, Postal 97, 78500, Rondopolis-MT, Brazilo ĉt ĉl

Lernejo Schule BG 15, c/o Klag, Diefenbachgasse 15, 1150 Wien Aŭstrio ĉt

Grupo da esp-istoj de kor pri m, pm, bk, teatro, turismo. Skribu al: Ellen RIIM, Tamusaare 119-34, SU-200033 Tallin, Estonio (telegrafistino)

Ibolya KASZONI, Bul. Independetes m 80 Bedean BED3 A14 R 4150 Odorheiu-Sec jud.Harhita, Rumanio, 17j studentino, *literaturo*, arto, sporto

Azis TAHERI, Kafete SINA.Kh.Alavi.5631 Bonab (Azarbaivan) Irano, 17j, ĉt

Hasan SPAFII, Ketab Ferushrye. Mirzakhani, Kh. Matahari, 5631 Bonab, Irano, ĉt

Kemal Arnaut, Yu 72207 PUHOVAC-Arnauti, Jugoslavio, 18j ĉt ĉl knabo

Arnaut Halid, KAJAGAN. Yu-72207 PUHOVAC-Arnauti, Jug, 16j knabo ĉt ĉl

xmxmxmxmx

xmxmxmx

xmxmx

xmx

x

Esperantský klub

29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka

Presajŝo

EK MH 41/86